



# P A C O

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

## HINDA OCEANO - ZONO DE PACO

Arsene. Ratsifehera

La Prezidanto de la Demokratia Respubliko Madagaskaro, s-ro Didier Ratsiraka, proponis kunvokon de konferenco en Antananarivo en la fino de 1981 aŭ en la komenco de 1982, je nivelo de estroj de ŝtatoj aŭ ĉefoj de registaroj, kun tasko realigi la plurloje akceptitajn proponojn pri transformo de la Hinda Oceano al regiono de paco.

Dum la lastaj ok jaroj en UN kaj en neregistaraj forumoj estis voĉdonitaj multaj proponoj pri transformo de la Hinda Oceano al areo de paco, ĉar la riskoj pri militminacoj kaj konfliktoj en tiu ĉi regiono estiĝas ĉiam pli kaj pli gravaj.

Usonaj militbazoj situas de sudo al nordo, de oriento al okcidento sur la Hinda Oceano. Inter ili menciindas la plej forta — la bazo Diego Garcia, kie en lasta julio albor-diĝis 12 000 ŝipoj kun peza kargo. Usonaj kaj britaj militŝipoj tage kaj nokte krosas la oceanon. Siaflanke la francoj posedas militbazojn, armetrupojn, reton de telekomunikiloj kaj militŝiparon en Comores, Djibouti kaj sur la insulo de la Reunion. Fine, la eŭropaj ŝtatoj de la Komuna Merkato planas kreon de novaj maraj fortoj, sendotaj al tiu regiono.

La ekspansio de la fortoj efektiviĝas pri defendo de la „petrolvojo“. Ĉirkaŭita de militbazoj de Usono kaj ties aliancanoj, kaj devigita protekti siajn ŝipojn, kiuj ligas la eŭropan kun la azia parto de ĝiaj teritorioj, ankaŭ USSR sendas siajn marajn fortojn al la Hinda Oceano.

Konsiderante la gravecon de la situacio, la Prezidanto de la Demokratia Respubliko Madagaskaro proponis al la interesitaj registaroj de Usono, USSR, Francio, Britio, Japanio, Ĉinio, al la apudbordaj ŝtatoj de la Komuna Merkato kaj al la Buroo de la neengaĝitaj ŝtatoj, kolektiĝi en Antananarivo por diskuti subskribon de Akto, garantianta sekurecon de senescepte ĉiuj ŝipoj, navigantaj sur Hinda Oceano. Post realigo de tiu garantio sekvos redukto de la nombro de ŝipoj en la Hinda Oceano kaj nuligo de ĉiuj militbazoj.

Laŭ tiu maniero la nobla ideo pri transformo de la Hinda Oceano al areo de paco kaj de internacia kunlaboro estos fin-fine realigita.

(El „Nouvelles Perspectives“)

# du jarojn post la agreso

Bohuslav Borovička

## Leviĝo el ruinoj kaj cindro

Du jaroj. Ĉu malmulte? Tiamaniere oni povas nevole demandi sin dum promeno tra la stratoj de Cao-bang, centro de la samnoma provinco, situanta proksimume kvardek kilometrojn de la ĉina landlimo. Antaŭ du jaroj ĉi tie frontis unu el la ĉefaj direktoj de la ĉina agreso. La agresantoj post obstina batalado okupis la urbon kaj antaŭ sia retiriĝo ili ankoraŭ sukcesis preskaŭ terebenigi ĝin. Dum mia unua vizito en la jaro 1979 mi vidis la ruinigitan urbon, kies provizoraj loĝantoj estis preskaŭ ekskluzive vjetnamaj soldatoj.

Hodiaŭa Cao-bang tre diferenças de la antaŭlastjara. La plejmulto de la konstruaĵoj en la urbocentro ankoraŭ restas en ruinoj, sed apud la ruinaĵoj elkreskis stakoj da purigitaj brikoj, uzataj de la loĝantaro por ripari siajn domojn kaj konstrui novajn loĝejoj. Tiuj, kiujn oni rekonstruis dum la lastaj du jaroj ne estas tiom multaj, granda parto el la dek kvin mil loĝantoj loĝas ankoraŭ en provizoraj loĝejoj, sed urbo iom post iom leviĝas el la ruinoj kaj cindro, en kiuj transformis ĝin la maŭistoj.

## Ĉi tie ni estas hejme

Senpere post liberigo de Cao-bang oni devis solvi la problemon, kie komenci rekonstruon de la urbo. Aperis eĉ opinioj, ke estus eble pli bone kaj sekure translokigi la centron de la provinco aliloken, pli malproksimen de la landlimo. La loĝantoj de Cao-bang fociĝis la solvon. Cindro de la brulejoj ankoraŭ ne malvarmiĝis kaj en la ruinigitan urbon komencis reveni jam ĝiaj loĝantoj. Ili venis kun malplenaj manoj, plejmulton de sia havaĵo ili devis ĉe la evakuado forlasi en siaj domoj, kiuj nun detruitaj kaj ruinigitaj troviĝis en ruinoj. Le-van-Nhu estas majstro en malgranda teksejo, unu el kelkaj laborejoj, nun denove fabrikantaj. Kiel milicano li partoprenis la urbodefendadon. Poste li kun sia taĉmento foriris al la montaro kaj post la malamika fronto daŭrigis la batalon. Li revenis al Caobango inter la unuaj.

„Ĉi tie inter la montoj mi naskiĝis kaj travivis la tutan vivon. Ĉi tie ni estas hejme kaj ne permesos, ke oni elpelu nin. Se estos necese, ni denove foriros al la montaro, sed hejmen ni ĉiam revenos.“

Nhu ne unuan fojon tenis armilon en siaj manoj. Jarojn longe li batalis kontraŭ francoj, partoprenis eĉ la legendaran batalon pri Dien-bien-phu (Djen-bjen-fu).

„Ni tiam eĉ ne pensis, ke ni iam devos defendi nin kontraŭ niaj najbaroj. Ni ja havis la samajn idealojn kaj celojn kun ĉinoj, kiuj ĉi tie vivis,

ni ĉiam vivis en harmonio. Des pli multe ĉagrenas la perfido, kiun oni faris en Pekino. Ili perfidis ne nur nin, sed eĉ la propran popolon.“

Evidente ne ĉiu loĝanto de Cao-bang esprimus sin per la samaj vortoj kiel Nhu, malnova partiano, membro de la urba komitato de la komunistarta partio de Vjetnamio. Sed vortoj ne estas la plej gravaj. Ĉi tie loĝantaj homoj montras per sia laboro, ke ili ne venis ĉi tien provizore. Kvankam la rekonstruo de la urbo progresas malrapide, oni faras ĝin serioze, tiel oni rekonstruas la domon, en kiu oni deziras travivi la tutan vivon.

Cao-bang estas unu el la luliloj de la vjetnama revolucio. Ĝiaj loĝantoj staris en la unuaj vicoj de la batalantoj por sendependeco, de ĉi tie gvidis prezidanto Ho Si Min la batalon kontraŭ la francaj kolonistoj. Sian heroecon pruvis la loĝantoj de ĉi tiu montara provinco dum la ĉina agreso kaj pruvas ĝin ankaŭ per sia hodiaŭa laboro.

## Helpis la tuta lando

Cao-bang kaj ĝiaj loĝantoj ne restis kun sia tragika destino solaj. La tuta lando helpis kaj helpas rekonstrui la detruitan limregionon. Grupoj da volontuloj el entreprenoj kaj institucioj de Hanojo, Haiphong, Than-hoa, ŝtatestroj el Thai-nguyen, studentoj.

En unu el la ĉefstratoj de Cao-bang staras nove konstruita lernejo, unu el la ok nun funkciantaj lernejoj de la urbo. Du vicoj de la simplaj teretaĝaj dometoj kaj inter ili vastampleksa korto. La kolonoj de la pordego dume estas simbolaj; por konstrui barilon kaj murojn ne estis tempo. Sur la pordego tabulo anoncas, ke ĉi tiun lernejon konstruis la urbaj loĝantoj kunlabore kun hanoaj laboristoj per la rimedoj, donacitaj far loĝantoj de la ĉefurbo.

Similaj tabuletoj povus ornami preskaŭ ĉiun pli grandan konstruaĵon, ili povus pendi preskaŭ sur ĉiu entrepreno, kiu jam fabrikas aŭ preparas renovigi la produktadon. Krom la „hanoja“ lernejo troviĝas ĉi tie ankaŭ lernejo el Thanh-hoa, entrepreno por fabrikado de konstrumaterialoj konstruita helpe de la laboristoj el haiphonga cementfabriko. La maŝinfabrikoj de Hanojo, Vinh kaj Thai-binh helpis ekipi kaj ekfunkciigi mekanikan kaj riparan laborejojn.

„Post liberigo de la urbo, kiam komencis reveni la unuaj loĝantoj, ni devis prepari kaj funkciigi por ili almenaŭ la plej bezonatajn kondiĉojn kaj servojn“ — rememoras Lam, deputito de la provinca kompartia komitato. „Renovigi

akvokondukiĵon, establi provizorajn sanitarajn centrojn, konstrui lernejojn. La urbogantoj mem komencis ripari kaj rekonstrui la domojn. Brikoj kaj ŝtonoj por tio bezonataj troviĝas en la ruinoj ankoraŭ en sufiĉa kvanto. Samtempe ni kune kun enlandaj kamaradoj funkciigis kelklajn gravajn mastrumobjektojn, laborejojn, kie ni riparas difektitajn maŝinojn kaj simile. Kompreneble, propraforte ni sukcesis fari ne nur multe komplikitajn farendadojn; iom post iom, precipe dank' al la helpo el aliaj provincoj ni povis solvi ankaŭ pli ampleksajn problemojn. Tamen vi povas vidi, ke ni havas ankoraŭ multon farendan.“

Kun Lam mi interparolis en konstruaĵo de la politika lernejo, provizora restadejo de la patriaj kaj ŝtataj organoj en Cao-bang. La konstruaĵoj, kie restadis la provinca kompartia kaj nacia komitatoj, restas ankoraŭ en ruinoj. Vico por ripari ilin ankoraŭ ne alvenis. Unue oni devas provizi ĉiun per tegmento super la kapo.

### Sur la loko de la krimoj floras krizantemoj

La vilaĝo Hoa-an troviĝas proksimume kvar kilometrojn for de Cao-bang. Konsistigas ĝin nur kelkaj domoj, kaj oni povas trovi ĝin nur sur la plej detalaj geografiaj kartoj. Malgraŭ tio pri ĝia nomo eksciis en marto de 1979 la tuta mondo. Ĝi ja fariĝis scenejo de la terura, animskua krimo. En la puto malantaŭ unu domo oni post foriro de la ĉinaj agresantoj trovis kelkajn dekojn da brutale mortigitaj virinoj kaj infanoj. Dum evakulado ili eraris la vojon kaj falis en la manojn de ĉinaj soldatoj.

Tute hazarde mi alveturis al Cao-bang ĝuste tiam, kiam oni trovis la puton plena de kadavroj, mi do vidis la teruran bildon propraokule. La virinoj kun disbatitaj kapoj aŭ tratanĉitaj gorgoj, multaj kun beboj en la ŝtofsakoj surdorse:

unu el la „heroaĵoj“ de la soldatoj, montranta la veran vizaĝon de la milito, komencitan de maŭistoj kontraŭ siaj najbaroj.

Ankaŭ al Hoa-an revenis la paco, sur fenestrobretoj de la domoj denove estas floroj, la homoj laboras sur la kampoj, en larĝa rivereto naĝas multkolora anasaro. Laŭ mallarĝa vojeto ni venis post la domon numero dek ok; dekstraflanke ni tie antaŭ du jaroj vidis ankoraŭ fumantan brulejon en la loko, kie staris lernejo. Hodiaŭ la loko estas surkreskita per alta herbo kun centoj da malgrandaj, bluaj floroj. Iom pli malproksime post barilo troviĝas la puto. Nun ĝi estas ŝutplenigita, kaj surloke de la krimo elkreskis diverskoloraj floroj, per sia formo similaj al niaj krizantemoj. Simpla tabulo sur betonkoloneto memorigas, ke komence de la marto ĉi tie la ĉinaj soldatoj barbare mortigis dek naŭ virinojn kaj dek ok infanojn.

La malgranda herbejo malantaŭ domo numero dek ok en vilaĝo Hoa-an estas surkreskita per herbo kaj floroj. Ili hodiaŭ certe floras ankaŭ sur la tomboj de la viktimoj. La cikatroj en la tero rapide kovriĝis per herbo. Sed du jaroj estas malmultaj por resanigi la vundojn en la koroj de tiuj, kiuj perdis iun el siaj parencoj aŭ proksimumoj. Ili estas malmultaj ankaŭ por renovigi ĉion, kion la agresantoj neniigis. Sed la danĝero ne forpasis. Atestas pri tio ankaŭ kaŝejoj en la lerneja korto kaj informoj pri daŭrantaj provokoj de la maŭistoj.

La instruo el la antaŭlasta jaro avertas. Pro tio la homoj devas zorgoplene prikonsideri siajn fortojn kaj rimedojn kaj pli multe ol en la pasinteco fordoni ilin por la defendo de sia patrujo.

*Esperantigis Jindřich Tomišek*

## SENMATRIKULAJ MALLIBERULOJ

Laŭ la Pariza Kontrakto kaj la Komuna Deklaracio (1972), la Usona registaro kaj la tiama reĝimo de Sajgono estis devigitaj tute liberigi ĉiujn patriotajn armeanojn kaj civitanojn arestitajn dum la patriosava rezistado. Sed, ĝis nun (1974 j), la aŭtoritatoj de Sajgono liveris al ni nur kelkmilojn el la nombro de ducentmil arestitaj kaj ankoraŭ en 1971 j. enkarcerigitaj en ĉiuj sennombraj malliberejoj sur la suda teritorio de Vjetnamio okupita de Usono. Kiom da

miroj da malliberuloj, tiom da miroj da patriotoj! Kelkmil vivoj, pri ĉiu el kiuj oni povus skribi libron! Kelkmil vojoj malsimilaj kondukintaj ilin al la patrisava vojo kaj malliberejoj. Ĉiu arestito estis punita je minimume du jaroj kaj maksimume dek sep jaroj! Se ni supozus mezan kondamnon je kvin jaroj por ĉiu punito, la produkto estos miliono da jaroj! Miliono da jaroj, kia nombro! Inter tiuj estas homoj de vira kaj virina seksoj, junuloj kaj maljunuloj, i. a. estas infanoj naskitaj en la malliberejoj mem, aŭ arestitaj kun aŭ anstataŭ iliaj patrinoj tiel ke iu vjetnama filmistino en sia freŝeta televidfilmo nomis ilin „la senmatrikulaj malliberuletoj“.

Ho! „Kio estas la kulpoj de tiuj verdaj kanoj?“ (Nguyen Du). Jes, pri kio tiuj verdaj kapoj kulpis? Tiuj puraj, naivaj, senkulpaj infanoj! Kie sur nia planedo estas plenkreskaj homoj kiuj ne ĝojas aŭdante la infanajn ridojn? Kiuj gepatroj laciĝintaj de ĉiutagaj laboroj ne havas freŝĝojajn sentojn, vidinte ridetojn de naiva infano?

La infanaj ridoj puraj kiel kristalo etendiĝas en la spaco, sub freŝa vetero kaj dolĉa venteto. Kiu povus imagi ke tiaj senkulpaj infanoj, la plej aĝaj ne atingas dek jarojn, la malplej aĝaj — du jarojn, ja estis malliberuloj sub la malbonega reĝimo de Usono-Thieŭ — en la plej aĉa senco de tiu substantivo. Kiuj povus imagi, ke ili vivetis en ĉelo kiel maturuloj, eltenis varmegon, aermankon, malsaton, soifon, batojn ktp. . . Plej aĉe estas ke tiuj infanoj eltenas tiajn eksterordinarajn maljustaĵojn tiam, kiam ili ne ankoraŭ finis siajn infannaivecojn, kies spritkapableco ne permesis kompreni kial tiaj „plenkreskuloj“ (t. e. la torturistoj) kortrankvile mistraktis ilin“. Estas knaboj kiuj ankoraŭ estis ĝerموj en siaj patrinaj uteroj, kiam tiuj ĉi estis arestitaj, torturitaj ĝis perdo de la konscio, reviviĝis, ree svenis. . . Kiu povas aserti ke tiaj brulantaj batoj ne lasis malhelpajn postsignojn en iliaj animoj, kiam ili estis enformiĝantaj? Kaj tiaj „nevoj“ estis naskitaj en la malliberejoj. Mi forgesis substrekti, ke en la malliberejoj, ili havis neniom lauleĝajn vivkvotojn de infanaj viktimoj. Iliaj patrinoj, „onklinoj“ — amikinoj de iliaj patrinoj—devis oferi parte siajn proprajn minimumajn tagajn porciojn por nutri ilin. Knabino Hoa (floro) estis naskita rekte sur malvarma cementa planko de la ĉelo. Ŝiaj „onklinoj“, „avinoj“ devis disŝiri siajn proprajn nesufiĉajn vestaĵojn por kudri mane etajn vestojn, tukojn por kovri ŝin kiel ili antaŭe kovris aliajn ruĝkolorajn korpetojn ĵus elirintajn el siaj patrinaj ventroj. Ne estis akvo por lavi ilin, nek medikamentoj. Ili pluvivis, vegetis, kaj kreskis kiel prahistoriaj bestoj en praarbaroj!

Rigardante la infanojn ĝoje fosi la sablon por eltiri etajn krabojn, kolekti belajn multkolorajn, multformajn konkajaĵojn, moluskojn. . . mano en mano maldiligente promeni sub la filantaj arboj, mi eksentis korpremetojn. Knabineto Kim Em, kvaraga, tenante la manon de Nguyen Thi Hang, malpli aĝa ol ŝi, tre maldika, humila, vage marŝetis kaj interparolis. Subite Hang diris: „Mi estis en malliberejo dum tri jaroj“. Tiuj paroloj trapikis mian koron kiel ruĝvarmegan lancan. Ho ve! Kial tiaj korbruligaj paroloj povas eliri el tia malgranda, bela, senkulpa buŝo!“

Mi amike asociiĝis kun ili, konversaciis kun iliaj patrinoj. Sinjorino Nguyen Kim Linh, tridek tri jara, arestita en aŭgusto 1977, kiam ŝi plenumis savpatrian mision ĉe ponto Öng Lanh (Sajgono) je la tria posttagmeze. La torturistoj batis ŝin de tiam ĝis la noktomezo, sed nenion eltiris el ŝia buŝo. Je la dua de la sekvanta tago, ili eniris la infangardejon kaj perforte kaptis la etan Em kun intenco torturi la knabinon por kapitulacigi la patrinon. Ili forĵetis Kim Linh en la ĉelon ĉiufoje malsukcesinte eltiri perfidajn konfesojn; samtempe ili lasis Kim Em sola en la koridoro tagnokti. Pro malsato kaj soifo ŝi ploris longe kvar tagojn ĝis ŝi perdis la voĉon. Finfine Kim Em sukcesis trovi la ĉelon de sia patrino. Feliĉe, ĉe la pordo troviĝis malgranda truo. Kim Em enŝovis sian malgrandan fingron de dudek



tri monatojn aĝa knabino... Kim Linh aliadirekten enmetis la sian. . . kaj la du fingroj intertuŝiĝis. Ege ĝojigita, Kim Em ĉesis plori, eĉ ridetis, metis sur la truon sian buŝeton kaj mallaŭte vokis: „Amata panjo! Enirigu min al vi!“ Pelinte sian ploron, la patrino respondis: „Mia karulineto! Mi tion tre ege deziras, sed oni ne permesas. Iru peti tion de la gardistoj!“ Obeante, Kim Em tion petadis al ili, sed vane, ŝia voĉo restis voĉo en dezerto. Post multaj torturoj al Kim Linh sen iu ajn rezulto, la leŭtenanto Iro

forprenis kaj minacis torturi Kim Em por inklinigi la patrinon paroli. Leŭtenanto Iro furioze vangofrapis Kim Em. La knabino sentime lin insultis. Iro freneze grumblis: „Estu fidela al via Partio. Mi finmortigos ambaŭ-kaj patrinon kaj filinon!“ Post tio, li tiris Kim Em al sia skribotablo, perforte pikfiksitis per du pingloj la du dikfingrojn de la etulino al la tablosurfaco. Kim Linh, kvankam ŝiaj ambaŭ du manoj estis katenitaj kaj ŝin retenis du policanoj, ne povis kontraŭbati ilin, ŝi tutforte kriis insultante la torturiston. Konsciinte sin senpova Iro fine ĵetis ambaŭ kune en la sama ĉelo. Ĝis nun kiam mi skribas tiujn linojn la du vunditaj ungoj de Kim Em ne ankoraŭ cikatriĝis kvankam du jaroj ja pasis. Kim Linh rakontis al mi ke, survoje al la resanigejo situanta en la zono liberigita de la Provizora Registaro de Sud-Vjetnamio kiam ŝiaj veturiloj renkontis grupon de ĵurnalistoj el eŭropaj socialismaj landoj, Kim Em, per sia maneto montris la vizaĝon de iu grandulo, tutforte kaj malamege kriis:

„Panjo! Vidu la usonanon! Pereu tiu aĉulo kiu torturadis min! Eksciinte la intrigon, oni ne sciis kion pensis tiuj eŭropanoj, sed ĉiuj vjetnamoj vidantaj tiun spektaklon lasis flui siajn larmojn. Jen, la imago pri Usono en la okuloj de niaj infanoj estas tia. . . Krom Kim Em, la aliaj geetuloj Le Ngoc Tu, dekjara, Ha Thuy Huong, okjara, Le Van Trung, sepjara kaj kelkdekoj da aliaj, ĉiuj havas proprajn historietojn kordolorigajn ne malpli ol la historio de Kim Em.

Nguyen Hai Trung

(Verko publikigita en gazeto THONG NHAT n-ro 227 la 05/1/1974, elvjetnamigita de la aŭtoro mem. Ni publikigas ĝin kun mallongigoj).



USSR

### GRANDA JUBILEO

La 14-an de februaro en la Leningrada Domo de Amikeco estis organizita solena celebrado de S. N. Podkaminer, okaze de lia granda jubileo — 80-jara naskiĝdato kaj 60-jara partopreno en la Esperanta movado.

La solenan kunvenon krom Leningrada esperantistaro partoprenis reprezentantoj de aliaj urboj de Sovetio kiel Moskvo, Novgorod, Kiev, Riga, Vilnius, Tallin kaj aliaj.

La parolintoj substrekis lian fidelecon al la Esperanto-movado kaj konvinkon pri ĝia finvenko. Ili parolis ankaŭ pri la granda laboro farita de li por fonda de Asocio de Sovetaj Esperantistoj, pri lia multjara aktiva laboro por la paco en kadro de Mondpaca Esperanto-Movado.

Oni emfazis, ke spite al sia aĝo S. N. Podkaminer estas junanima homo, bone komprenanta la junularon. Kelkaj salutantoj legis proprajn versaĵojn, dediĉitajn al la jubileulo kaj akompanatajn de muziko.

S-ro Podkaminer estis dekoraciita per ora insigno de l'Unuiĝo de Sovetaj Asocioj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (SSOD) por multjara aktiva laboro kaj okaze de la jubilea naskiĝdato.

Bulgara Esperanta Asocio elektis S. N. Podkaminer honoran eksterlandan membron de la Asocio kaj enmanigis al li membrokarton N 1.

S-ano Podkaminer ricevis multe da diversaj gratulleteroj kaj telegramoj de esperantistaj, sovetiaj kaj eksterlandaj Esperanto-organizoj kaj multajn gratuldonacojn.

La celebrado finiĝis per amatora koncerto, kiun partoprenis ankaŭ grupo de junaj profesiaj aktoroj, studentaj Esperanton.

G. N. Mostovskoj

### „STELO DE L'ESPERO“

La junpionira Palaco en Sud-Urala urbego Ĉeljabinsk ekzistas jam jarojn. Je la 41-a jaro en ĝi aperis Esperanto-rondeto. Organizo de E-kolektivo en tia fama, aŭtoritata infaninstitucio prezentis gravan sukceson.

Jam post la unuaj paŝoj nia rondeto montriĝis kiel kolektivo de junaj pacbatalantoj. La membroj de la rondeto dum la ferioj laboris en poŝtejo. La ricevitan monon ili sendis al Soveta Pacfonduso. Parton de l'mono ili uzis por aĉeti kajerojn kaj aliajn lernohelpilojn. La kolektitaj objektoj estis senditaj al Nikaragvo.

Ni sendis leteron al Pola Radio por esprimi nian soliderecon kun Polio dum ĝiaj malfacilaĵoj.

Estonte ni planas diversajn laborformojn. Ekzemple ni volus helpi al multnombraj rondetoj en nia junpionira Palaco ekkorespondi kun eksterlandaj kolegoj. Do junaj pentristoj, dancistoj, astronomoj, teknikistoj, amatoroj de foto, naturo, scienco, arto, ankaŭ junaj aktivuloj en diversaj formoj de infanmovado — ĉiuj skribu al Ĉeljabinska Junpionira Palaco. Ni fervore tradukados.

Mi mem havus ian “profiton” de tio. Mi estas ĵurnalisto kaj pri ĉia utila afero en la rondo mi nepre informas per la loka gazetaro, radio. Mi nepre skribos ankaŭ pri interesaj leteroj ktp. Ĉio ĉi utilas por Esperanto-propagando!

Ankaŭ la junaj esperantistoj mem volonte ekkorespondos tutmonde pri multnombraj. En la rondo „Stelo de l'espero“ ekzistas du grupoj po 15 geknaboj 13—15-jaraĝaj. Do skribu al ni! Respondo certa.

Nia adreso: USSR, 454080 Ĉeljabinsk, Alojce pole Dvorac pionerov, Esperanto.

V. Rojdestvenskij

gvidanto be rondeno „Stelo de l'espero“

CSSR

Partoprenantoj de III-a Renkontiĝo de Pacdefendantoj en Parbubice (ĈSSR), okazinta la 21.3.81 akceptis rezolucion pri sekureco, konservo de la paco, interpopola kunlaborado. La aŭtoroj evidentigus, ke instigado al milito estas karakteriza por kapitalismaj fortoj, kiuj gajnas de armilproduktado. Ili emfazis, ke la esperantistoj, kiel la tuta popolo havas esan interson por konservo de la mondopaco, por paca disvolviĝo de ĉiuj landoj kaj ties paca kunlaborado. La rezolucio finiĝas per jena alvoko:

„Ni alvokas la esperantistojn de la tuta mondo senkompromise batali kontraŭ la militinstigantojn, kontraŭ tiuj, kiuj alproprigas al si eĉ regionojn situantajn milojn da kilometroj de ilia propra lando; kontraŭ tiujn, kiuj klopodas gajni superecon per superarmado por traktadi el pozicio de forto.

Ni volas pacon! Tiu ĉi sopiro je paco kunigu la esperantistaron de la tuta mondo, ke ĉiu el ni agu por ĝi laŭ siaj propraj fortoj.

Ni alvokas vin ĉiujn, vin kun ni kaj faru ĉion por venko kaj konservo de daŭra mondopaco!

Jugoslavio

### NOVAJ PAROLADOJ DE TITO EN ESPERANTO

La Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino eldonos baldaŭ en Esperanto broŝuron dediĉitan al la Sesa Konferenco de ĉefoj de ŝtatoj aŭ registaroj de la neengagiitaj landoj okazinta en septembro 1978 en Havano (Kubo). En la broŝuro aperos rezolucio pri speciala rekono al prezidanto Tito, salutparolado de Seku Ture okaze de rekono fare de la Konferenco al Tito, dankvortoj de Tito al la Sesa Konferenco, ankaŭ lia parolado en la ĝeneralaj debatoj. Krome, en la broŝuro aperos informoj pri la Konferenco kaj plej signifaj ekstraktoj el la Fina Deklaracio kaj aliaj dokumentoj.

# ekumena voĉo de paco

**Sovetunio.** En Moskvo estis eldonita biografio de papo Johano la 23-a, verkita de metropolitano Nikodim. La verko estas riĉe dokumentita kaj akcentas gravajn ekumenajn kaj porpacajn instigojn de tiu ĉi granda papo. . .

**Usono.** Okaze de la 52-jara jubileo de naskiĝa tago de Martin Luther King, la ĝenerala sekretario de la Konferenco de usonaj katolikaj episkopoj Thomas Kelly akcentis la signifon de defendado de la homdigno kaj de la elementaj rajtoj de homoj malriĉaj kaj subpremataj. Li diris, ke tiu ĉi negra apostolo de neperforta progreso, murdita en urbo Memphis en 1968, estas "simbolo de braveco kaj sinforĝesa oferemo, kiuj elemente gravas en nia strebado al pli bona mondo."

Plue li apelaciis al usonaj instancoj, ke ili solvu la ekonomiajn malfacilaĵojn kaj problemojn de senlaboreco, speciale zorgante pri la bezonoj de malriĉaj kaj subremataj homoj, ĉar malriĉeco, rasismo kaj ekonomia malegaleco bedaŭrinde ankoraŭ ne malaperis el la usona socio. Fine li esprimis esperon, ke la spirito de M. L. King helpos forigi maljustecon kaj diskriminacion en la nuna malfacila epoko de Usono kaj konkludis: La vivo de M. L. King inspiru nin solvi niajn tutŝtatajn problemojn tiel, ke estu atingita ĝenerala bono kaj egala homdigno por ĉiuj loĝantoj de Usono."

**Ĉeĥoslovakio.** Grupo de japanaj budhanoj komencis la 21.9. 1980 en Londono mondan pacmarŝon por ĝenerala nuklea malarmado. La marŝo finiĝos en aprilo 1981 en Tokio. Kadre de ĝi la grupo vizitis la 17. I. 1981 la naziisman koncentrejon en ĉeĥoslovaka urbo Terezín. Tie ili honoris la memoron de miloj da mortigitaj homoj, alvokinte la konsciencon de la tuta homaro: „Ne plu Hiroŝima, ne plu koncentrejoj, ne plu rasa malamo.“

**Japanio.** Papo Johano Paŭlo la 2-a vizitis la 25.2. 1981 japanan urbon Hiroŝima, sur kiun Usono en aŭgusto 1945 ĵetis la unuan atoman bombon. Tiu okazo la papo faris paroladon, en kiu li apelaciis al ĉefoj de ŝtatoj kaj registaroj, klopodi pace solvi ĉiujn internaciajn problemojn, sukcesigi la tutmondan malarmadon kaj ne permesi novan militkatastrofon.

**Aŭstralio.** La ĉefepiskopo de urbo Sydney, kardinalo James Freeman, proklamis en sia mesaĝo: „Ĉiu homo fariĝu konstruanto de paco. La paco ne konsistas nur en tio, ke ne estas milito, sed ĝi devas esti zorge, konstante kulturata en ĉies koroj, hejmoj, vivmedioj. Kolero kaj malakordo estas malamikoj de paco.“

**Francio.** La prezidanto de la franca episkopa konferenco, kardinalo Roger Etchegaray, episkopo de Karseille analizis la kaŭzojn de la „absoluta manko de vivrimedoj“ je kiu suferas 800 milionoj da homoj en la tuta mondo, proklamante: „Tiu ĉi stato estas honto de la homaro. Al efika batalo kontraŭ mizero kaj malsato ne mankas materiaj rimedoj, sed v o l o rifuzi sistemon, en kiu la superflua konsumo unuflanke, estas kompensata per nesufiĉa konsumo aliflanke.“

**Finlando.** La internacia fakto de la finna evangelia luterana eklezio, al kiu apartenas 80 procentoj de la finnlanda loĝantaro, instigis al intensigo de la porpaca aktivado en spirito de la Fina Akto de Helsinki.

**Japanio.** Papo Johano Paŭlo la 2-a vizitis la 25. 2. 1981 urbon Hiroŝima, kie ĉe la granda „monumento de paco“ pie honorigis la memoron de naŭdek sep mil viroj, virinoj eĉ infanoj, kies nomoj estas gravuritaj sur tiu ĉi monumento — viktimoj de la unua atombombo. La pian akton ĉeestis miloj da homoj, el kiuj multaj ĝis nun suferas pro sekvoj de tiu ĉi eksplodo. Poste papo faris en 9 lingvoj — kortuŝan, instigoplenan alvokon al la homoj de la tuta mondo (esenco):

„Milito estas homa faro, signifanta morton. Antaŭ 36 jaroj ĝi kulminis sur tiu ĉi loko per amasmorto. Malgraŭ tio, ke travivintoj de tiu ĉi teruraĵo ne emas rememori ĝin, tiu ĉi rememoro urĝe necesas, ĉar ankoraŭ ekzistas homoj ne volontaj elimini eblon de nuklea konflikto. La rememoro je Hiroŝima signifas: principe ne permesi eblon de nuklea milito, ĉar ĝi egalus mepereigon de la homaro, kiu ja ne estis kreita por mem-

## EN LABORTENDAROJ 500 KURSANOJ

La Esperanto-Junularo de Bosnio kaj Hercegovino organizis instruadon de Esperanto en ĉiuj kvin junularaj labortendaroj dum la somero 1980 en tiu ĉi jugoslavia respubliko. Okazis entute dek kursoj por ĉirkaŭ 500 gejunuloj. Krom instruado de la lingvo la kursanoj informiĝis pri la E-Movado kaj ĝia baza organiza laboro. La kursojn sukcese gvidis 12 junaj aktivuloj el diversaj lokoj de Bosnio kaj Hercegovino.

## SOMERA LERNEJO EKfunkciis

La E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino organizis en julio 1980 unusemajnan Someran E-Lernejon por aktivuloj kaj membroj de siaj organizoj kun la celo kapabligi novajn instruantojn de la Internacia lingvo. La lernejon partoprenis 35 gejunuloj el 10 lokoj. Kuraĝigite de la plena sukceso de la lernejo, la organizantoj planas ripeti tian aranĝon ankaŭ en la somero 1981.

mortigo! Ĉiuj konfliktoj povas esti solvataj ne perforte, sed per traktadoj. Tial ĉiuj homoj, amantaj vivon, instigu siajn registarojn kaj reprezentantojn klopodi por interesoj de paco kaj ne nur por propraj interesoj egoismaj, profitavidaj. . . Vojo de paco, bazita sur justeco, estas ununura digno de homo!

La atombombo ĵetita sur Hiroŝima, malgraŭ la teruraj sekvoj, estis nur infanludilo kompare al modernaj nukleaj armiloj, kies nunaj stokoj kapablas multfoje detrui tutan planedon Teron. En intereso de la vivo kaj de la homaro mi alvokas ĉiujn homojn de bona volo en la tuta mondo: aktivigu en viaj vivmedioj por likvido de ĉiuj nukleaj armiloj, por konservo de paco! La milito ne estas neevitebla! Precipe vi, junuloj, ne pasive alrigardu la danĝeran mondevoluon, sed transprenu kunrespondecon en malblogo de la militkatasrofo kaj konstruado de justa paco. Vi havas junajn, ardajn korojn, plenajn de amo — viaj originaj, kuraĝaj iniciatoj povus alporti la plej efikajn rezultojn. Sur tiu ĉi tragika loko, kie la „scienca progreso“ kaŭzis enorman homan malfeliĉon, mi turnas min al dio — Kreinto de la naturo, homo, vero kaj belo kun tiu ĉi universala preĝo de Hiroŝima: Nia komuna fonto de vivo, evoluigu en ni — ĉiuj homoj de la tuta mondo — senton de respondeco pri la vivo sur tero, harmonion inter niaj agoj kaj Konscienco, prudenton anstataŭigi antaŭjuĝojn per interkompreniĝo, forton venki malamon per amo, inspirojn por transformi maljustecon en justecon, kuraĝon por ŝanĝi vojon de milito en vojon de paco kaj entuziasmon ĉie konstante pluflorigadi vian donacon — vivon.“

**Usono.** Delegacio de usonaj katolikaj episkopoj protestis ĉe ministro de eksterlandaj aferoj Muskie eĉ en la „blanka domo“ kontraŭ la usona subteno de la salvadora hunto. La episkopoj postulis — montrante nehumanan atencadon kontraŭ homaj rajtoj far la salvadora reĝimo en ĉesigon de la arma helpo al ĝi — Okaze de la 1-a datreveno de murdigo de la San Salvadora ĉefepiskopo O. A. Romero — 24.3.1981 — okazis multaj kunvenoj por honorigo de lia memoro postulantaj ankaŭ ĉesigon de tiu ĉi arma helpo.

**Hispanio.** Delegacio de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj — internacia paca forumo kuniganta anojn el 25 landoj de Eŭropo — vizitis en la tagoj de 19.2.—22.2.1981 Madridon kaj transdonis al delegacioj de la Madrida kunveno jenan memorandon (esenco:) „Kiu amas homojn, amas pacon kaj strebas pri ĝia plifirmigo. La febra armado ege embarasas la internacian evoluon post Helsinki, kreante medion de timo. Sed sub traŭmatismo de timo ne povas ekzisti paco.“

Konstanta pritraktado de nur duarangaj aferoj ne ŝirmas la mondon kontraŭ la nova militkatastrofo. Tial viaj madridaj konsultoj koncentriĝu por solvo de la ĉefa problemo trovi vojon al haltigo de la febra armado kaj komenco de efika malarmado.

La VII-a plenkunsido de nia Berlina konferenco en sia pasintjara „Desdena manifesto“ apelaĉiis eŭropajn katolikojn, ke ili kun ĉiuj homoj de bona volo strebu pri tio, ke „nia kontinento fariĝu oazo de paco sen amasmortigiloj, ekzemplo de kunlaboro sen malamikeco, modelo de justeco sen diskriminacio kaj antaŭjuĝoj.“ Tio restas nia celo, kiu devus fariĝi eĉ elementa orientiĝo por viaj madridaj konsultoj.

Ni kaj milionoj da eŭropanoj kun rajtigitaj espero observas viajn madridajn konsultojn. Ni ĵurligas ĉiujn ĉeestantajn delegaciojn ne seniluziigu tiujn ĉi esperojn! Memoru: kunlaboro anstataŭ konfrontado — tio estas ordono de nia epoko!”

**Aŭstrio.** Aŭstria unuiĝo de ekleziaj periodaĵoj eldonis alvokon al ĉiuj kontraŭuloj de eksporto de aŭstria armiloj, kiu estis represita en tiuj ĉi aŭstriaj periodaĵoj. Ĝi akcentas komunan respondecon pro eblaj teruraĵoj, farataj per la eksportataj aŭstria armiloj kaj iniciatas — ĉar simpla protesto kontraŭ la armilfabrikistaj negocioj jam ne plu sufiĉas — plebisciton pri ŝanĝo de la armileksporta leĝo. La nova leĝo devus garantii pli superan moralan respondecon, renovigi la bonan reputacion de Aŭstrio kaj konfirmi konstante vivan kristanan solidarecon kun la subpremataj popoloj de la evolulandoj kontraŭ kiuj tiuj ĉi armiloj estas precipe uzataj.

**Nederlando.** La sinodo de la Nederlanda Reformita eklezio eldonis fine de jaro 1980 alvokon por Forigi Nukleajn armilojn el Nederlando. Ĉar plurflankaj intertraktadoj pri senarmigo ne sukcesas, la sinodo sekvante instruon de Kristo proponas iri vojon de unuflanka senarmigo. Ni opinias, plene konsciante respondecon pri nia socio, ke la forigo de nukleaj armiloj el Nederlando estus tia nedubesenca paŝo.

Ni alvokas ĉiujn subteni tiun ĉi proponon! En la nuna epoko de grandaj danĝeroj por la tuta homaro necesas ne timi, sed kuraĝe venki ĉiujn obstaklojn por religi nuklean malarmadon en nia lando. Nia ekzemplo certe plifortigis la internacian fidon kaj instigos ankaŭ aliajn ŝtatojn ekpaŝi tiun ĉi vojon al tutmonda paco. Pacaktivuloj, traduku la simbolan, instigoplenan „Preĝon de Hiroŝima“ nacilingvan kaj popularrigu en viaj vivmedioj.

Ĝi estu preĝata ĉiun unuan dimanĉon en monato, kiel tutmonda inspira momento (rememorigo, averto, devoligo) de Hiroŝima, kies tragedio okazis la unuan semajnon en aŭgusto 1945.



# LA SENLABORECO

„La senlaboreco atingis neaŭdite altan gradon. Frosto, malsato kaj malhelo pli ol iam regis en la loĝejoj de la mizeruloj, se ili entute ankoraŭ havas loĝejojn. Ĉie de mateno ĝis vespero homoj frostotremantaj, kun malplenaj stomakoj, frapadis la pordojn almozpetante, precipe en kvartaloj, en kiuj same tiel malriĉuloj vivas, ĉar en kvartaloj de riĉuloj tre ofte ne malfermiĝas pordo al tia frapanto.

Ĉiufoje, kiam vespere iomete ekneĝis, staradis longaj vicoj da senlaboruloj antaŭ la dungejoj por neĝforigantoj.

Multaj el ili, malsataj kaj nesufiĉe vestitaj, devis post kelhora starado en ventohurlo kaj neĝkirlo foriri aŭ esti forpelataj. Kaj poste en frua mateno, kiam oni komencis dungi neĝlaboristojn, okazis kortuŝaj interbataloj pro kelhora laboro malbone pagata. Kiu foje vidis ĉi tion kaj kiel la centoj da homoj kiuj ne estis tiom feliĉaj ricevi ŝovelilon, sin fortrenis kun malĝoje klinitaj kapoj, iuj eĉ plorante, tiu ne plu kuraĝos paroli pri mallaboremo de senlaboruloj.“

La ĉi-supra longa prologo estas eltirita de la libro „Sur Strato 4“ de nia samideano H. Weinhengst. La nura motivo citi tiun prologon estas montri al la leganto, ke la senlaboreco ne estas nova fenomeno, ĝi ja estas klasika malsano de la tiel nomata ekonomio de merkato. La libro bone montras la situacion, en kiu disvolviĝis la socio en Aŭstrio dum 1929.

Eble ekde tiu dato ĝis nun ni iom progresis, almenaŭ rilate la eksterajn aspektojn de nia ĉiutaga vivo. La realo evidente ne montras iun ajn progreson. La nuntempa tiel nomata okcidenta socio tute ne ŝanĝiĝis kompare al la stato priskribita de nia samideano H. Weinhengst la formo kaj la sistemo restas la samaj. Daŭre ekzistas diskriminacio inter la diversaj tavoloj de la socio, en kiu troviĝas riĉulo kaj malriĉulo, laboristo kaj mastro.


Leĝoj, jes, leĝoj jam ekzistas, kiuj protektas la laboristojn, sed ekzistas iu leĝo kiu nuligas ĉiujn aliajn: la rajto al la privata posedo, kaj en tiu tereno la mastro ja rajtas fari tion, kion li volas, ĉar la laboristoj jam estas parto el tiu privata posedaĵo, plia ilo, eble la plej grava, sed ĉiukaze privata instrumento de la mastro.

En la burĝa socio la leĝoj estas tiel bone miksitaj, ke kiam laboristo estas maldungata, la mastro demetas ĉiujn siajn respondecojn. Se iu laboristo deĵoris dum kvardek jaroj en iu entrepreno kaj la mastro decidis ĉesigi ĉian aktivadon, ĉi tiu ne havas iu ajn respondecon, kaj la kvardek laborjaroj havas nenian signifon por li, eĉ ne sentimentalajn, ĉar li, la mastro, certe diros: mi pagis al vi, do mi nenion ŝuldas al vi. Juste estus, ke tiu, kiu profitis de la rento produktita de la laboro, okupiĝus en la malbonaj cirkonstancoj

pri la bezonoj de tiuj, kiuj ĉion donis al li — la laboristoj.

Jen ni estas sur la vojo al senlaboreco. Komenciĝas asembleoj. Ĉiu laboristo eldiras sian propran opinion, kaj en ĉi tiu tereno oni nepre kaj bedaŭre diri, ke malofte ekzistas unuanima opinio. Eĉ ofte okazas, ke multaj laboristoj ne konscias pri la vera situacio de la entrepreno kaj pri la vera intenco de la mastro. Seriozajn kaj malagrablajn momentojn oni devas travivi. La ruzeco de la mastro ne haltas, kaj li serĉas unu kaj mil formojn por dividi la laboristojn, pri kio la fiaskintaj entreprenistoj estas multe pli kapablaj ol por bone regi sian negocon, eĉ mi pensas, ke ili ĝuas tiun situacion. Ili ploras, ploregas, ili sin prezentas kiel viktimoj de la cirkonstrancoj, ili kulpigas pri la krizo la laboristojn, la ŝtaton, ili kulpigas kiun ajn, sed ili sin ne kulpigas, tute ne.

Kiam posedanto de kiu ajn entrepreno decidus ĉesigi sian negocon certe li atingas sian celon almenaŭ laŭ la leĝoj nuntempe ekzistantaj en Hispanio. Do, al la laboristo restas nur unu vojo, la vojo al senlaboreco. La hejma ekonomio de iu ajn laboristo ĉiam estas malforta, kaj se al tio oni aldonas la nericevon de salajro, oni devas kompreni en kian malesperan situacion falas la laboristo. Li perdas sian laborpostenon, ricevas nenian salajron kaj devas batali, por ke oni rekonu al li liajn rajton. Certe estas momentoj ne enviindaj. La tolerebla hejma trankvileco ne plu ekzistas kaj la rilatoj inter la familianoj ne ĉiam disvolviĝas bone. Do, la laboristo vidas sian hejmon ruinigita, ne nur ekonomie, sed ofte ankaŭ spirite. Ĉi tiu situacio estas la plej danĝera, ĉar kiam oni perdas la familian etoson, la familiajn valorojn, la vivo fariĝas nevivinda. Tamen oni devas nepre aldoni, ke ĉiuj laboristoj kaj iliaj familioj ĝenerale kuraĝe superas ĉi tiun krizon. Ĝi estas io mirinda, tiu ĉi instinkto al vivo, por kiu batalas ĉiu homo, ĉiu laboristo.





Tia estas la vivo en nia socio, en kiu oni "defendas" la rajtojn de la homo. Almenaŭ tion oni asertas surpapere.

Mi memoras, ke iam laborkamarado en unu el tiuj asembleoj diris al mi: amiko senlaborulo, kion mi faris, por ke oni forigu min kiel hundon, post tridekvinjara laborado en ĉi tiu entrepreno? Mi estis bona laboristo, mi neniam protestis, li aldonis. Kion oni povas respondi al li? Mi kamaradece manfrapetis lian maldeskran ŝultron kaj tio estis mia respondo. Se li en tiu peza momento ne kapablis kompreni la kaŭzon de sia situacio, kion oni povas fari?

Ofte publike oni petas helpon al ĉiu preterpasanto, oni etendas la manon, kvazaŭ ni estus mizeruloj, vagabondoj. Ne estas enviindaj tiuj travivaĵoj, kara leganto, kredu al mi. Oni petas helpon de

aliaj kamaradoj, kiuj ankoraŭ laboras en aliaj entreprenoj. Per tiu mono oni aĉetas manĝaĵojn, kiujn oni distribus inter la laboristoj, kies familioj bezonas urĝan helpon. Necese estas aldoni, ke ne ĉiam ĉi tiuj surstrataj manifestacioj disvolviĝas pace, ofte la tiel nomataj "fortoj de la ordo" batas la malfeliĉajn laboristojn. Jen la panoramo: sen laboro, insultataj, batataj, malesperiga estonteco kaj la familio en plej granda mizero, tio estas la bildo de nia bela, homa kaj racia socio, nomata ekonomio de merkato aŭ kapitalista.

Ĉu ĉi tio estas novelo?

Ĉi tio estas la granda novelo de la vivo.

Luis Serrano Pérez (Hispanio)

Maria Dombrovska

## ĈI TIE OKAZIS ŜANĜO

(Fragmento de rakonto)

Jaro mil naŭcent kvardek kvina. Varsovio libera. En la unuaj tagoj de februaro, starante ĉe la fenestro de mia ĉambro en duno da paperoj, libroj kaj... neĝo, mi rigardas la senpalisitan, neĝokovritan, kotoplenan Ĝardenon-tombejon. Tomboj estas jam preskaŭ dudek. Oni mortis ĉi tie jam tuj post nia foriro en oktobro. Sed ne plu spuroj de la bienaj konstruaĵoj, ne plu estas la domo volvita per sovaĝa vinberujo. Elstaras nur forbrulintaj muroj kun rektangulaj truoj de iamaj pordoj kaj fenestroj, tra kiuj videblas amaso da rubo. Oni bruligis ĉi tiujn tri brikdomojn, memoraĵojn pri la pasintaj jarcentoj, dum la kruelega vintro, kiam la malamiko sisteme bruligis la urbon, centobligante la damaĝojn kaŭzitajn pro la ribelo.

Sed nun „la ŝanĝoj sur la scenejoj de mia vidaĵo“ sekvas tiel rapide, kvazaŭ sur turnoscenejo. Jen estas rapidege riparita lerneja domo en kiu brue svarmas amasego da infanoj kaj junuloj. Unu gimnazio funkcias matene, alia posttagmeze, komence ĉe petrollampoj, kaj baldaŭ elektra lumo, vivbolas diversaj perfektigaj kursoj.

Proksimiĝas la unua postmilita somero. La ĝardenrestaĵoj verdiĝas, kiel ili povas, per kio ili povas. La sovaĝa vinberujo sin sternas denove sur la nigriĝintajn ruinojn antaŭajn gazonojn kaj bedojn surkreskas abunda herbaĉaro. Ĝi kovras ankaŭ la tombojn, apenaŭ oni povas ilin eltrovi sub lavango da artipiloj kaj sovaĝaj okzalaj. La antaŭa ĝardeno tuj fariĝis ludtereno de la lerneja infanaro kaj junularo. Ili ĉiuj krian-

te, pro sovaĝa vivoĝojo kuradis kaj saltis sur la tombojn, tretante la restaĵojn de la pereintoj. Iam iu stumblas kontraŭ putriĝinta kruceto, rektigas ĝin, momenton ekmeditas kaj plu kuras, krias.

Gimnazion en tiu ĉi domo vizitadis dum la posttagmezaj horoj mia dektrijara nevo kaj milita edukito Jurek. Iun tagon mi montras al li tra la fenestro, kiel infanoj kuradas sur la tomboj. — „Rigardu — mi diras. — Jen la tomboj de la ribelintoj, vi senhonorigas ilin per via saltado. Ĉu vi ne povus obeigi la infanojn? Igi ilin preni la tombojn sub sian protekton? Proponu, knabo, ĉi tion al la klaso“. Jurek ruĝiĝas. Li estas timema. — Iel mi ne kuraĝas, eble ili ne obeos min. Vi tion pli bone esprimos. Skribu leteron al la lernejo“. — „Bone! Knabo mia, vi havas la kapon sur la ĝusta loko.“ Do mi skribas leteron, kiun Jurek devas doni al sia instruisto por ĝin legi antaŭ klaso. Morgaŭe, kiam dum la aŭtuna vespero mi sidas laborante ĉe la skribtablo, enkuregas rekte al la lernejo Jurek kaj vokas: — „Nu, kiel? Vi vidis?“ — Distriĝema kaj ensorbita de pensoj, mi demandas: „—Kion vidi? Kion vidi?“ — „—Kion vi demandas, onjo! — indignas li elrevinta. — Leterojn vi skribas, kaj eĉ tra la fenestro vi ne rigardus? Ja ni laboris tutan matenon! Vidu kiel tie nun aspektas!“ — „Bedaŭrinde estas jam mallume.“ — „Domaĝe — ĉagreniĝis Jurek. — Nu, ne forgesu rigardi morgaŭ tuj kiam vi vekigos.“

Apenaŭ vekiginte — kiel ordonis al mi Jurek,

mi rigardis tra la fenestro, kaj tio, kion mi ekvidis, superis miajn esperojn. La malgranda tombejo estis tute purigita de herbaĉaro. Ĉiu tombo ornamita per aŭtunaj floroj kaj ĉirkaŭita per briketoj aŭ ŝtonetoj. Krucoj precize rektaj, kaj inter la tomboj — belege balaitaj vojetoj.

Iun decebran nokton alvenis la terenon de la estinta ĝardeneto eltombiga brigado kaj matene post la tomboj restis nur malkompakta tero. Alian tagon per ŝnuregoj oni faris danĝeran murtestaĵon antaŭ mia fenestro. Ke la junularo el la lernejo asistis dum tiu detruado, — tio estas memkomprenebla. Ke ĝi ŝparis, avaris dum ĉi tio nek gorgojn nek pulmojn, kriante kvazaŭ freneze, oni eĉ diri ne necesas.

Poste mi vidis, kiel sub premeĝo de manoj kaj piedoj forrompiĝis la restaĵoj de l'arbustoj sur la rudimentoj de la ĝardeneto. Mi vidis, kiel unu matenon iu venis, forhakis kaj poste elterigis la lastan arbon en ĉi tiu loko, la arĝentan popolon. La antaŭa ĝardeno fariĝis malmole tretita placo, ne plu kaŭzanta iujn obstaklojn al la frenezanta junularo. Pro tio, ke mankis lernejoj konstruaĵoj la instruhoroj estis diversaj, estis do neniu horo dum la tago, kiam la placo ne bolus per la vivoĝojo de etaj kaj grandaj infanoj de la nacio. Tiu ĉi tumulto penetris mian ĉambron eĉ tra duoblaj fenestroj, do ankaŭ vintre. La vojeto tretita tra montetoj de ruboj formis bonegan sledkurejon, glaciigintaj akvoŭflakoj fariĝis glitejoj, oni eĉ ludis sur ili improvizitan hokeon. La bruego de la ludoj ĉesadis nur dum pluvegoj: do mi komencis beni la tre pluvajn tagojn, malgraŭ ke pli ol ĉio mi tre ŝatas serenajn ĉielon. La bruo de la ludoj dum la unuaj jaroj post la milito ne ĉesadis — mi substrekas tion ĉi — eĉ dum lernejoj ferioj. Malpli lacigis min la infanoj, pli la plenkreskaj knaboj ludantaj piedpilkon. La obtuza sono de piede frapata pilko estis aŭdebla kun akompano de tia kriego, kvazaŭ ĉi tie okazus matĉo en asistado de multmila homamaso. Ĉi tio ofte daŭris tutan posttagmezon, ĝis preskaŭ deka vespere. La junularo havas bonajn okulojn, kaj la someraj vesperkrepuskoj estas longaj.

„Ĉi tie okazis ŝanĝo sur la scenejo de mia vidado.“

Ĉi-foje ŝanĝo okazis ne tiom en la ekstera scenejo de la panoramo antaŭ mia fenestro, kiom mia rilato al tio, kio antaŭ ĝi okazis.

Mi komencis kutimiĝi al tiu pulsado kaj bruo, mi ekis observi kaj filozofie konsideri ĝian naturon. Jen hodiaŭ post kelkaj jaroj de la nova periodo en nia historio, mi sumigas la esencon de la ŝanĝoj, kiuj okazis eĉ sur tiu ĉi kelkdekmetra panoramo antaŭ miaj fenestroj. Kiel mi jam menciis, la tumulto kaj la bruo sur la placo komence daŭris dum tuta jaro. Nur en la kvardekoka kaj kvardek-naŭa mi rimarkis, ke dum la someraj monatoj la placo ofte dum tuta tago restis malplena.

Tiu ĉi silento ne bezonis komplikajn komentariojn. Ĝi atestis pri la pulsado de la nova vivo, kies naturo forigis la junularon el la polvo de la

ruinoj kaj rekonstruado al la kampoj kaj herbejoj, al la montoj, al la maro.

Alia afero, kiu min pensigis, estis observadoj pri la karaktero de l' min malhelpantaj ludoj. Eble dum la du unuaj jaroj post la milito la infanaro amuziĝis plej ofte per hororaj ludoj. Plej ofta objekto en la manoj de la etaj knaboj estis lignaj mitraloj. Eĉ etaj knabinoj partoprenis tiujn ludojn, imitante la raŭkan bojadon de l'alarmo-sireno, eksplodojn de bomboj, fuĝon en kelojn ktp. Ne nur unu fojon rigardante ĉi tion, mi pensis kun zorgo, ke ne malaperos militoj, dum infanoj tiele ludos. Hodiaŭ infanoj sub miaj fenestroj amuziĝas jam alie. Ĉu por longe? Ĉu por ĉiam? Pri tio decidis plenkreskuloj. Bedaŭrinde, foje mi aŭdis, kiel infano demandis la patrinon, ĉu en la vendejo de ludiloj oni povas aĉeti atombombeton.

„Ĉi tie okazis ŝanĝo sur la scenejo de mia vidado.“

Oni komencis la konstruadon de la Marŝala Loĝkvartalo. Dum longa tempo nur la brako de grandega gruo portanta sablon aŭ brikojn, ŝoviĝis super la pejzaĝo konsistanta el rubomontetoj kaj altaj skeletoj de brikdomoj ĉe la strato „La 6-an de Aŭgusto“ (kiu unusola „revenis al la pasinto“, ricevinte nomon Novoviejska). Sed iun tagon alvenis al la placo antaŭ mia fenestro du fosmaŝinoj, du grandegaj buldozoj, aperis brigadoj de junuloj — ekpulis bruego, antaŭ kiu ĉiuj ĝisnunaj estis nur susuro de zefiro, sed ĝin mi eltenadas multe pli bone. Eble tial, ke la antaŭaj bruadoj estis ia sanktigo de ruinoj, kaj la bolado de maŝinoj, kiun mi nur aŭdas, ĝi estas bruo de krea penado. Ĝi kortuŝas kvazaŭ pulsado de viviga fonto, kvankam fumas ĉi tie nebulego da polvo. Sed krom la ĝojo, ke ankaŭ nia ruinigita kvartalo eniris la ciklon de rekonstruado, krom la maltrankvilo, kiel tio ĉi aspektos, aperis en nia domo timo, ĉu oni ne malkonstruos ĝin. Ja klaĉoj diris, ke ĝi estos malkonstruita baldaŭ, ĉar ĉi tie pasos nova strato, ĉar „oni jam estis kaj mezuris“ ktp. La racio kriis: „ne eblas“. Post multaj alarmaj klaĉoj, post super skulptomodeloj, skizoplanoj, skemoj ni kun espero konstatis, ke nia domo, savita el tiom multe da kataklismoj, ne fariĝos viktimo de la rekonstruado.

Do mi rigardas el mia ĉambro, kun kiu ligiĝis mia vivo kaj koro, al tiomfoje ŝanĝiganta pejzaĝo antaŭ mia fenestro kaj mi penas imagi la domojn kaj konstruaĵojn, kiuj ĉi tie elkreskos. Eble sur la loko de la malaperinta ĝardeno ekvivos nova ĝardeno, verdejo inter la loĝblokoj por la homoj de krea laboro. Laboro por la nova ŝanĝo sur scenejo de mia vidado.

*El pola lingvo: Antoni Madaj*

\*pepeŝo — soveta mitralo

\*xx SP — Servo por Pollando

**Pierre Perret**  
(*franca kanzonisto*)

### LILI

Ne mankis la belec' al ŝi, Lili,  
alvenis ĵus el Somali', Lili,  
kun enmigrantoj en la ŝip'.  
Parizon ili venis por  
rapide esti sen labor'.

Si kredis ja al egalec', Lili,  
en land' de Hugo kaj Volter', Lili.  
Sed en muziko nigroj du  
egalas unu blankon nur.  
La diferenc' vibebblas tuj.

Sopiris ŝi je liberec', Lili,  
kaj revis ŝi pri la fratec', Lili.  
Kun digna tono hotelist'  
al Lili diris sen hezit':  
— Nur por blankuloj tie ĉi!

Kestegojn devis porti ŝi, Lili,  
laborojn aĉajn faris ŝi, Lili,  
brasikojn vendis sur bazar',  
dum kolorfratoj sur la strat'  
ŝin helpis per pikmartelad',

Sin oni nomis "Neĝulin'", Lili  
ŝi trovas tre amuza ĝin,, Lili,  
eĉ se grincadas la dentar',  
ne cedas ŝi al la koler'.  
Ridigus ilin la mizer'.

Frizulon blondan amis ŝi, Lili,  
kaj estis preta je edziĝ, Lili,  
sed diris la bofamili':  
— Rasistoj ja ne estas ni,  
sed tio eblas ne ĉe ni.

Si provis vivi en Uson'. Lili,  
tiu demokratia land', Lili,  
sed ŝi konstatis kun sufer'  
ke la kolor' de malesper'  
samtiel nigras tie for.

Sed dum mitingo en Memfis', Lili  
renkontis Anĝelan Davis, Lili.  
Anĝela diris: — Ho fratin'.  
kuniĝu ni, kaj for la tim'  
de l' lupoj kiuj gvatas nin.

Kaj por la timon puŝi for, Lili,  
ŝi levas pungon pro koler', Lili,  
meze de la sovaĝa ar'  
kiu bruligas buson ĉar  
en ĝi nur rajtas blankular'.

En via batalado, vin, Lili,  
renkontos iam bona vir', Lil',  
kaj se naskiĝos la infan',  
koloron havos ĝi de am',  
la ĉiam nevenkebla am'.

Ne mankis la belec' al ŝi, Lili,  
alvenis ĵus el Somali', Lili,  
kun enmigrantoj en la ŝip'.  
Parizon ili venis por /  
rapide esti sen labor'.

*Elfrancigis: André Cherpillod*

### TRIPTIKO

**Gafur Gazizi**

### NE LONGE LA JUGO TEMPESTOS!

Jam dronas en nokto profunda  
la mondo premita de dormo,  
alfluas mallumo inunda  
kaj moke rikanas lunkorno.  
Trembrilas la steloj kaprice,  
teruron aŭguras obskuro,  
ekhurlas la vento malice: /  
timtremas arbar' kun murmuro.  
La monto — monstrego moroza —  
senmovas ĉe vojo severe,  
ĉiel' de nubaro haosa  
jam estas kovrata konkere.  
Sed longe la jug' ne tempestos,  
aŭbados aŭror' kun aŭdaco,  
serena maten' ekmajestos  
kaj ree ekregos la paco.

### PRINTEMPO VENAS KUN AMO

El nokto vintra frostoj kuras,  
printempa vento pelas ĝin.  
Vekite la ĉiel' lazuras,  
jubilas birdoj en fascin'.  
Glacioj sur rivero knaras,  
rompiĝas, naĝas en torent'  
kaj suno varmon malavaras,  
tenere tiklas freŝa vent'.  
Degelas neĝ', vaporas tero,  
galanto floras en arbar'  
ĉe flak' aperas verda herbo  
kaj flirtas papilia par'.  
Printempo venas kun aromoj —  
sezon' de juno kaj de am'.  
ĝi amon vekas ĉe la homoj,  
varmigas koron kvazaŭ flam'.

### POEZIA MATENIGO

Sun' superba sugestias  
en somermateno min,  
per fascino fantazias  
ebriigas kiel vin'.  
Goje, ĝue en ĝardeno  
mi min banas en aŭror'.  
serenadon al sereno  
trilas laŭte birda ĥor'.  
Freŝo friska frenezigas,  
polmotrinkas roson mi;  
min inspiras, min instigas  
la maten' al poezi'.

### Glosoj:

*aŭbado* — amkanto plenumata ĉe  
mateniĝo  
*fascin* — nerezisteble allogi, ravegi  
*friska* — malvarmeta  
*moroza* — malgajhumora  
*polmo* — manplato  
*superba* — plejbela

La 15an de marto 1981 la nederlanda televido elsendis intervjuon kun la inventinto de la neŭtrona bombo, usonano Samuel Cohen (elp. Kohén). La nederlanda televi-draportisto Frank Wiering (elp. Viring) iris al Los Angeles por serĉi lin en lia luksega vilao. La intervjuo estis iom publikigita en la nederlanda progresema periodaĵo „De Groene Amsterdammer” de la 18a de marto 1981. Jen la intervjuo:

**D.** Kiam vi inventis la bombon?

**R.** En la somero de 1958. Komisiono de la Ministerio de Defendo petis al mi pristudi la eblecon fari nuklean armilon por uzado sur batalkampo. Mi tiam vojaĝis al unu el la laboratorioj, kie mi malkovris eltrovaĵon, el kio estiĝis la neŭtronbombo.

(Cohen sidas ĉe tableto kaj skizas silueton de urbo). Alte en la aero, proksimume 1000 m super la urbo, mi eksplodigas mian bombon. Pro la eksplodo ĉiuj neŭtronoj samtempe eliĝas kaj priradias ĉi tiun regionon. Oni devas eksplodigi la armilon alte en la aero. Pro tio la detrua efiko de varmego kaj aerpremo estas tenata malproksime de la tersurfaco. Tial oni priskribas la bombon kiel armilon, kiu mortigas homojn, sed kiu indulgas proprietojn. Kiam oni demandas al mi ĉu ne estas malmorale mortigi homojn kaj indulgi konstruaĵojn, tiam mi diras: la homoj estas malamikaj soldatoj kaj indulgi civitanajn proprietojn estas tute juste. Ĉu vi deziras kokolon?

(Laŭ Cohen civitanoj povas fari la jenon, kiam eksplodas atommilito: foriri se estas tempo aŭ kaŝi sin subtere en ŝirmejoj). Li daŭrigas: Se NATO decidus uzi neŭtronajn armilojn en Eŭropo la konstruado de ŝirmkeloj por la civila loĝantaro estas facila kaj malmultekosta. Por ĉiu proksimume 100 dolarojn. Tio estas ĉio. La ŝirmado estas tiel malmultekosta pro ke oni devas ŝirmi sin nur kontraŭ radiado. Ŝirmado kontraŭ aerpremo ne bezonata.

**D.** Mi komprenas. Sed strange estas, ke vi ĉiam parolas pri Eŭropo. Pri milito en Eŭropo. Kaj hazarde mi loĝas tie.

**R.** Estas logike, ke mi parolas pri Eŭropo. Mi pri tio povas nur diri, ke vi havas la malfeliĉon esti najbaroj de la soveta bloko. Vi estas minacata.

**D.** Kio okazas pri la soldatoj, super kiuj eksplodas la bombo?

**R.** Tiuj estos gravege tuŝitaj de intensa priradiado per neŭtronoj. La plej multaj el ili en kelkaj minutoj estos paralizitaj. La radiado difektas la centran nervosistemon. Ili ne plu povos funkcii. Je pli granda distanco la radiado difektas la intenstan sistemon. La simptomoj similas al tiu de grava holero. Ankaŭ ili ne plu povos funkcii.

**D.** Ĉu ili mortos?

**R.** Jes, la plej multaj el ili mortos post iom de tempo...

La tankistoj en radiuso de tricent metroj de la eksplodo pro ŝoko paralizigos kaj mortos en daŭro de du tagoj. Gis 600 m. de la eksplodo la paralizo daŭras de 5 ĝis 45 minutojn. Ili tamen mortos post semajno. Inter 600 kaj 1000 m la tankistoj povos daŭrigi la batalon, sed ili mortos en kelkaj semajnoj.



**D.** Via filo militservas ĉe la floto. Kiel vi fartos, se via filo viktimiĝos pro via bombo?

**R.** Ho ne, ne la floto. La bombo ne estos uzata surmare

**D.** Ĉu vi preferas ke li estas minacata de torpedoj aŭ de neŭtrona bombo?

**R.** Mi preferas de torpedoj. Torpedoj efikas inverse. Ili detruas materialon, ne vivojn. Mi do preferas, ke lia ŝipo estos atakata per torpedoj, ĉar la bombo mortigas homojn kaj indulgas la ŝipon.

**D.** Ĉu vi rilate al tio dum la pasintaj dudek jaroj neniam pensis: ho dio, kion mi inventis?

**R.** Ne, neniam ajn. Ĝi estas la plejplej akurata armilo iam eltrovita. Tio ŝajnas esti fanfaroniĝo, tamen estas vero. Ion tian la mondo neniam vidis.

**D.** Ĉu vi supozas, ke okazos milito?

**R.** Jes. Estas terure por diri tion. Mi kredas, ke militado estas karakterizaĵo de la homo. Ĉiam okazis militoj, precipe en Eŭropo. Ĝi (Eŭropo) ĉiam estis tre militema. En ĉiu milito ĉiu partio uzis ĉiujn armilojn, kiuj ĝi havis je dispono. Mi do supozas, ke denove eksplodos milito, kvankam mi ne povas diri kiam ĝi okazos. Kaj certe estas, ke en tiu milito estos uzataj ankaŭ neŭkleaj armiloj. Nuntempe mi laboras pri defendsistemo, en kiu estas uzataj nukleaj armiloj, do ankaŭ neŭtronaj bomboj por reteni tre grandajn armeojn. Tiu plano ampleksas ankaŭ nukle-armilan barieron, kiun mi priskribas kiel nacian defendlinion laŭlonge de la landlimoj. Oni uzas ian formon de nuklea energio por reteni la malamikon.

**D.** Tiu linio troviĝos en Eŭropo?

**R.** Jes, mi precipe pensas pri Eŭropo. Tia sistemo tre bone estus uzebla sur la limo inter Okcidenta kaj Orienta Germanio, la Fera Kurteno. Sed la germanoj forte rezistas kontraŭ tiaj planoj.

**D.** Ĉu vi mem trovas vin sciencisto?

**R.** Jam ne. Ne tute. Eble sonas strange en la oreloj de viaj televidspektantoj, sed mi konsideras min kiel humaniston.

**D.** Kiel humaniston? Ĉu ne strange?

**R.** Jes, eble. Sed mi estas tre honesta.

**D.** Ĉu vi volonte eltrovas armilojn?

**R.** Honeste dirante, jes. Estas tre interesa okupo.

**D.** Kiel oni povas kreative labori farante neniigilojn.

**R.** Pardonu, la neŭtronbombo ne estas neniigilo...

**D.** Sed ĝi mortigas homojn.

Jes, malamikajn soldatojn. Tio ja apartenas al la milito.

**D.** Tiel ĉiam estis.

**R.** Kiun vi plej amas en la mondo?

(Karesante sian hundon): Ĝin mi plej amas. Sed ne diru tion al miaj edzino kaj infanoj, alie ili kolerus.

**Ru Bossong**



## MANKO DE INTERNACIECO KIEL KAŬZO DE ERAROJ EN ESPERANTO

Unu el la malfacilaĵoj de Esperanto estas ĝia ne tute konsekvenca sistemo de vortfarado, kiu rezultigas malsimetriojn<sup>1</sup> kaj malhelpas la aplikon de analogio en pluraj kazoj. Kiel ilustraĵon mi prezentas du citaĵojn, en kiuj estas po unu eraro. Ili certe ne kaŝos sin de akrevidaj esperantistoj.

1. „... plie, ambaŭ travivas ĉiujn internajn kaj eksternajn okazintaĵojn de l' vivo de sia „dua memo“ . . .“

*Hungara Vivo, 1978: 1, p. 35, k. 3)*

2. „La tuta nokto estis kiel la antaŭhalo de la inferno.“

*(Varmega Kamparo, Esperanta traduko de romano de Zsigmond Morics; manuskripto, p. 45)*

En la unua frazo „eksternajn“ estas la malĝusta vorto, kies laŭfundamenta formo estas „eksterajn“. En la dua frazo troviĝas „inferno“ anstataŭ „infero“. Ne estas eble scii kun certeco, kial la superflua „n“ enŝteliĝis en tiujn du vortojn. Ĉu la aŭtoroj mem pro nescio aŭ malatento uzis la erarajn vortformojn, aŭ ĉu temas tutsimple pri preseraroj? Miaopinio, ili ne estas preseraroj de la ordinara speco, ĉar estas eble racie klarigi la ĉeeston de la kroma „n“ en ambaŭ vortoj. Ni komparu jenajn parencajn vortojn en kvar etnolingvojn.

Eo. ekstera	interna	infero
L. externus	internus	infernus
F. externe	interne	enfer, infernal (adj.)
S. externo		inferno inferno
E. external	internal	inferno; infernal (adj.)
R. eksternat	(subst.) internat	(subst.)

La kaŭzo de la eraroj nun estas evidenta. La etnolingvaj vortoj devenantaj de L. *externus* ĉiuj havas la finan „n“ de la etima radiko. Krome, la antonimo L. *Internus* kun siaj etnolingvaj formoj montras paralelaĵon: la „n“ estas en la identa silabo de ĉiu vorto. Male, en la serio, kiu evoluis de L. *infernus*, „n“ mankas en F. *enfer*, kvankam ĝi ja troviĝas en la adjektivo *infernal*.

Kial do Esperanto devias de la reguleco karakterizanta la etnolingvojn? Ŝajnas, ke en la tre frua stadio de la disvolvo de Esperanto, Zamenhof malzorge elektis etnolingvajn etimojn por la radikoj de sia planlingvo. Li prenis de la L. prepozicio *exter*, kaj ne de la adjektivo *externus*, la vorton „ekster“. Sed por ricevi vorton kun la kontraŭa signifo, li ne povis agi analogie rilate la prepozicion *inter*, ĉar ĝia signifo en la latina lingvo ne permesas tion; ĝi montras la pozicion de iu aŭ

io en la spaco apartiganta du aŭ plurajn personojn aŭ objektojn. Li devis do elekti la adjektivan formon *internus* kiel etimon. Estas malfacile klarigi, kial Zamenhof ignoris la simetron de *externus/internus*, kiun spegulas ankaŭ la etnolingvoj konataj al li. La formo „eksterna“ tute ne kolizius kun iu alia vorto en Esperanto. La verkinto de la erarhava teksto estis sendube influita de unu aŭ pli da etnolingvaj vortformoj inkluzive de la samdevenaj hungaraj vortoj *extern/intern* kaj *externátus/internátus*.

En la dua citaĵo la tradukinto plej verŝajne uzis la vorton „inferno“ pro influo de la hungara *inferno* kaj eble ankaŭ de aliaj etnolingvaj formoj. Estas eĉ pli malfacile — vere neeble — scii la kialon de la zamenhofa elekto de la F. etimo *enfer* por „infero“<sup>2</sup>. En tiu ĉi kazo Zamenhof ne agis laŭ la vortoprovizaj principoj, kiujn li priskribas en la antaŭparolo de la Unua Libro:

„... la vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn „fremdajn“ kaj „teĥnikajn“) mi lasis tute sen ŝanĝo; el la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis. . . tiujn, kiuj estas komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj . . .“ (IKPV, 1973, p.

21).

Denove mi konjektas, ke „infero“ eniris la leksikon de Esperanto tre frue, antaŭ ol tiuj principoj estis klare formulitaj kaj aplikitaj.

La uzo de la radiko „infer“ anstataŭ „infern-“ malutilas ankaŭ en alia maniero. En la vortfamilia serio „interferi, oferi, preferi, referi, suferi“ mankas la verbo „inferi“. Etnolingvaj Esperanto-vortaraj tradukas E. *infer*, F. *inférer* kaj S. *inferir* per la vortoj „indukti, supoz ig/i, konkludi“. PIV registras la parencan verbon „inferenci“ kiel filozofian fakvorton kun la signifo „indukti, dedukti“.<sup>4</sup>

Ĉu okazis provo ĝustigi la vortojn „ekster/interna“ kaj „infero“ cele al la restaŭrigo de ilia simetrio kaj internacieco? En la zamenhofa reformprojekto de 1894 ĉiuj tri vortoj restis sensanĝe, (IKPV, 1974, p. 162 k. sekv.). Ankaŭ Ido heredis de Esperanto *exter/interna*. En la vortaro de Pesch (1964) la unua estas signita per EFIS, dum la dua troviĝas en DEFIRS, do ĝi estas evidente pli internacia. En Ido la radiko *intern-* estas pluformebla, kaj unu el la derivitaj vortoj estas *intern/ul/o*. Sed por indiki la kontraŭon Ido bezonas apartan radikon, *extern-*, kiu donas *extern/ul/o*. Estas strange, ke De Beaufront preteratentis tiun anomalion en Ido en sia kritiko de la vortfarado en Esperanto. En tiu ĉi lingvo la respondaj vortoj „*internulo*“ kaj „*eksterulo*“ estas facile formitaj surbaze de la du malsimetriaj radikoj, kaj kroma radiko ne estas bezonata.

Alia reforminto de Esperanto, René De Saussure (pseŭdonime konata kiel Antido), en Esperantido (sia unua provo plibonigi la zamenhofan lingvon), uzis la vorton *inferno* (René De Saussure, 1919, p. 34). sed en postaj versioj de lia projekto, okazis homonimeca kolizio kun la prepozicio *infero*, kiu anstataŭis la pli fruan *under*, „malsupre, infre“ (René De Saussure, 1928, p. 8).

Kaj plej verŝajne nur fakulo pri la topologia matematiko, kiel De Saussure mem, povas kompreni kaj uzi la komplikan sistemon de lokaj prepozicioj en Nov-Esperanto, kiu inkludas *extero*, *extro*, *intero* kaj *intro*.

En Ido *inferno* ricevis sian internacian „n“ kaj ĝi estas signita kiel EFIS. Tio ebligis la uzon de la radiko *infer-* en Ido por formi la verbon *inferar*, „tiri konkludon“. Aliaj naturalismaj planlingvoj preskaŭ senescepte uzas la internaciajn vortformojn.

Occidental: intern extern inferne  
Novial: interni exter inferne  
Interlingua: interne externe inferno  
Neo: interna externa inferno

Rimarku, ke nur Novial, kies aŭtoro Otto Jespersen estis profesia lingvisto, havas malsimetrian paron: *interni/exter*. Ĉu denove temas pri heredaĵo de Esperanto?

Per tiu ĉi analizo de du eraroj trovitaj en Esperantaj tekstoj, mi deziras substreki, ke malĝuste formitaj vortoj, t. e. vortoj, kiuj devias de la maksimume internaciaj formoj kaj kiuj ne apartenas al simetriaj grupoj, povas facile erarigi lernantojn de la lingvo.<sup>5</sup> Oni ne povas nun ŝanĝi la du pritraktitajn vortojn, ĉar ili jam estas Fundamentaj, sed estontece oni povas pli zorgeme analizi proponitajn vortojn por certigi, ke ilia formo estu plejble internacia kaj ke ili havu simetrian interrilaton kun jam ekzistantaj vortoj koncerne formon kaj signifon.

#### Notoj

1) Mi pritraktis pli detale la problemon de malsimetrio en Esperanto en jenaj jam publikigitaj artikoloj: Golden, 1975; 1978a, 1979a, b, c.

2) Ankoraŭ unu ekzemplo de fuŝa vortformado en Esperanto troviĝas en la *Unua Libro*. Tie la tempaj adverboj „ian, ĉian, kian, nenian, tian“ estas homonimoj de la akuzativaj formoj de la adjektivoj „ia-n, tian“ estas homonimoj de la akuzativaj formoj de la adjektivoj „ia-n, ĉin-n, kia-e, nenia-n, tia-n.“ En la Dua libro Zamenhof ŝanĝis la adverbojn al „iam, ĉiam, kiam, neniam, tiam“. Warin ghien (1959, p. 52, piendnoto 2) skribas:

„Ke tiel evidentan difekton . . . Zamenhof ne rimarkis antaŭ la publikigo, estas io al mi nekomprenebla.“

3) Mi proponas du eblajn klarigojn, kiuj tamen ne estas pruveblaj.

I. „Infero“ estas preseraro anstataŭ „inferno“, same kiel erara „vipuro“ fariĝis oficiala en la Fundamento anstataŭ la zamenhofa „vipero“. (Zamenhof, 1962, n-ro 45, p. 26).

II. Zamenhof elektis la radikon „infer-“ surbaze nur de la kvin etnaj lingvoj uzataj en la UV por traduki la Esperantajn vortojn: la franca, angla, germana, rusa kaj pola. Ne estas komuna vorto por infero en la du slavaj lingvoj, kaj Zamenhof ne povis uzi kiel radikon „hel-“ devenantan de la angla etimo *hell* pro homonimeco kun la adjektivo „hela“. Restis krom *D. Hölle* *F. enfer*, kies unua vokalo estis ŝanĝita al „i“, eble por proksimigi ĝin al la parenca vorto en aliaj lingvoj.

4) Alia planlingvisto akre atentigas pri tiu ĉi manko. Jen traduko de parto de artikolo de Louis De Beaufront verkita en Ido.

„Pri la teknika vortaro, estas tre bedaŭrinde, ke Esperanto ne sufiĉe zorgis, origine, pri tiu flanko de la vortaro por determini la plej bonan uzon de la radikoj; okazas ofte ke ĝi adoptis por ordinaraj konceptoj, sen sufiĉa konsidero kaj antaŭvido, radikojn, kiuj estas absolute necesaj (kaj

internaciaj) por teknikaj aŭ sciencaj ideoj . . . Ne estus grava kulpo preni la radikon *infer* por *D. Hoelle*, *E. hell*, *enfer*, *I. inferno*, *S. inferno*, se oni ne bezonus ĝin por traduki *D. inferieren*, *E. infer*, *F. inférer*, *I. inferire*, *S. inferir*. Cetere, la lasta eraro povus esti evitita, se oni estus observinta la derivitan adjektivon *E. infernal*, *F. infernal*, *I. infernale*, kiu pruvas (aŭ memorigas), ke la vera radiko estas *infern*, kaj ne *infer*. Multaj similaj ekzemploj, pruvas, kun kiom da senzorgo kaj malscienco estis kunmetita la vortaro de la primitiva Esperanto. (Louis DeBeaufront, 1927, p. 12—13).

5) Temas ne nur pri lernantoj, kiel la cititaj frazoj montras. Zamenhof mem faris similan eraron, kiam en *Rabistoj* li uzis la vorton „legiono“ anstataŭ „legio“. Kaj post Zamenhof tuta legio de esperantistoj faris la saman eraron, inkluzive de Antoni Grabovski en la antaŭparolo de la unua esperantlingva eldono de *Sinjoto Tadeo*. Surbaze de etnolingvaj ekvivalentoj „legiona“ kun „n“ estas pli internacia formo ol „legio“. Kial do Zamenhof elektis la formon „legio“? (Golden, 1978b, p. 11; Zamenhof, 1962, n-ro 36 p. 23)

#### Mallongigoj

D — Deutsch (germana) k. sekv. — kaj sekvaj  
E — English (angla) adj. — adjektivo  
F — Français (franca) Subst. — substantivo  
I — Italiano (itala) IKPV — Iam Kompletigota Plena Verkaro de L. L. Zamenhof  
L — Latinus (latina)  
R — Russkij (rusa) PIV — Plena Ilustratita Vortaro  
S — Spanish (hispana) UV — Universala Vortaro  
Eo. Esperanto

#### Bibliografio

##### Bastien, louis

1950. *Naŭlingva etimologia leksikono*. Chorleywood, Rickmansworth, Herts. Anglio.  
1927. *Lingual, ekstraktaj de „Progreso“*. Thaon-les-Vosges Francio.

##### Golden, Bernard

1975. „Lingvaj malsimetrioj“. *Heroldo de Esperanto*, (n-ro 1575—76), 18 marto 1975, p. 8.  
1978a. „Pri „fotografio““. *Esperanto*, n-ro 867, marto, 1978, p. 49.  
1978b. „La problemo de paronimoj en Esperanto“. *Paco*, vol. 25, n-ro 3, p. 10—11.  
1979a. „Malsimetrioj en Esperantaj loknomoj.“ *Venezuela Stelo*, n-ro 16, februaro 1979, p. 6—8.  
1979b. „Malsimetriaj malfacilaĵoj en Esperanto.“ *Esperanto en Skotlando*, n-ro 113, p. 18—21.  
1979c. „Nova tasko por la akademio: reguloj por la Esperantigo de etnolingvaj vortoj.“ *Dia Regno*, junio 1979, n-ro 6, p. 2176.

##### Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof

1973. *Unuaj libroj por esperantistoj*. Vol. 1. Kamecka, Japanio.  
1974. *Antaŭen al la laboro! tempo de „Esperantisto“*. Vol. 3. Kioto.

##### Plena Ilustrita vortaro

1964. *Diccionario de la 10.000 radiki di la linguo universala*. Ido. Zürich.  
1970. Paris.  
1919. *Nova formo de la Lingvo Internacia „Esperanto“*. Tria eldono. (Fundamento de la lingvo „Esperantido“). Bern  
1928. *Fundamenta krestomatia de la internacia Lingvo Nov-Esperanto*. Bern

##### Waringhien, Gaston

1959. *Lingvo, kaj vivo*. La Laguna, Hispanio.

##### Zamenhof, L. L.

1962. *Lingvaj respondoj*. Sesa eldono. Marmande, Francio. Julio 1979

M. L. Fanfani *L'opera di Bruno Migliorini nel ricordo degli allievi con una bibliografia dei suoi scritti*, Accademia della Crusca, Firenze 1979

re  
cen  
zoj

Bruno Migliorini estis unu el tiu, bedaŭrinde ne tro multnombra aro de lingvistoj, kiuj estis samtempe esperantistoj kaj elstaraj sciencistoj, rekonitaj kiel tiaj de la lingvista komunumo. Oni neniam sufiĉe substrekis la gravecon por nia movado de tiaj homoj, kiuj per sia prestiĝo donis, kaj pludonis, prestiĝon al Esperanto.

Finfine oni devas agnoski, ke — la homoj estas neraciaj, kaj ke la precize sama aserto akiras tute alian valoron depende de tiu, kiu ĝin eldiras.

Pro tio la esperantisteco de B. Migliorini estas unu el la atutoj minimume de la itala Esperanto-movado, precipe kiam temas pri disvastigo de la internacia lingvo en fakaj universitataj rondo.

La ĉi tie recenzata verko enhavas antaŭparolon de la nuna prezidanto de la „Accademia della Crusca“ (tiel nomiĝas la Akademio de la Itala Lingvo), kvin artikolojn de disĉipuloj de B. Migliorini, bibliografion de liaj verkoj, kaj plurajn indeksojn.

La antaŭparolo kaj la kvin artikoloj difinas la rolon de B. Migliorini en la itala lingvistiko kaj en la praktika lingvo-planado en Italio dum ĉi tiu jarcento. Efektive en Ita-

lio ne okazis sistema lingvoplanado, sed ja konsciaj klopodoj cele al kreado de neologismoj kaj al land-nivela normigo de la prononco.

Migliorini estis el la lingvistoj, kiuj plej efike kunligis fakajn lingvistikajn konojn kaj iun nedefineblan lingvan „guston“ (tian guston oni atribuas ankaŭ al Zamenhof), pro kiu kelkaj el la tialaj neologismoj kreitaj de li iĝis tre popularaj kaj vaste uzataj. Ili estas perceptataj de la itala parolanto kiel tute „nazuraj“ vortoj, kaj neniu pensas, ke ili estas „artefaritaj“. Inter ili elstaras vortoj kiel aŭtista (ŝoforo) kaj regista (reĝisoro).

Ĉi tiu interesiĝo pri la artefariteco de vortoj en „naturaj“ lingvoj trastrias la tutan sciencan vivon de Migliorini. En 1975, la jaro de lia morto, aperis unu el liaj lastaj libroj „Parole d'aŭtore“ (Sansoni, Firenze 1975) La titolo mem (Vortoj kun aŭtoro) indikas la enhavon. Temas fakte pri longa listo (110 paĝoj) de italaj vor-

toj pri kiuj oni sukcesis trovi la individuon, kiu ilin kreis.

Ankaŭ en ĉi tiu kampo Migliorini, tamen, ĉiam montris ekvilibron kaj atenton al la socio, kiu devas uzi la „kreitajn“ vortojn“. Kvankam li agnoskis la eblecon de individuo krei vortojn, li samtempe klare substrekis, ke tiuj vortoj havas vivoŝancon nur se ili estas akcepteblaj por la parolanto-komunumo. Tiajn konsilojn li ofte donis ankaŭ al esperantistaj „neologismemuloj“, kies kreomanio en la tridekaj jaroj ŝajnis endanĝerigi la pluan sisteman evoluon de Esperanto.

La bibliografia parto estas interesa por esperantologoj, ĉar ĝi ebligas esplorojn pri la esperantlingva verkado de Migliorini de la jaro 1914-a ĝis proksimume la jaro 1935-a. Oni ja scias ke post tiu jaro Migliorini nur malaktive sekvis la Esperanto-movadon, kaj la kialo de tiu „kabeigo“ restas ĝis nun ne certa. Ankaŭ tiu ĉi libro ne helpas ĝin kompreni.

Oni rajtas sin demandi ĉu temas pri vere kompleta bibliografio, kaj oni rajtas respondi ke ne, ĉar evidente tro malabundas indikoj pri artikoloj aperintaj en ne-italaj Esperantorevuoj.

Ĉiukaze ĝi estas atendita helpilo por seriozaj esperantologoj.

Paĝoj. 307, prezo 16.000 — italaj libroj, adreso de la aldoninto: Accademia della Crusca, Via di Castello 46 50 741 Firenze ITALIO.

Renato Corsetti



kores.  
pondemuloj

#### Bulgario

Nikola Obreŝkov, 5100 Gorna Orjahovica, str. Angel Kânĉev 16. Pri muziko — klasika kaj leĝera.

Sonja kaj Leonid Senj, kv. Piŝmana, bl. 79, vh. B. ap. 17, 5000 Veliko Târnovo, geedzoj kun ĉel pri ĉel. kolektas bk kaj pm.

#### Ĉinio

K-do Liu zhi-Qiang, Tacheng Region Middle School N 2 Xinjianŝ CHIMA. 42-jara, lingvo-instruisto kun tutmondaj s-anoj precipe pri ĝenerala lingvistiko kaj kiuj deziras lerni ĉinan lingvon.

#### USSR

Drobjazko Vladimir, 252127 Kiev, pr. 40 ut. Oktjabrja 122, kor. 2 kv. 28—22j., tm pri ĉel., metodoj de E-lernado

Gogoman Jgorj 252127 Kiev, pr. 40-letija Okbjaŝrja 118/1, kv. 97—20-j. studento-hemiisto tm. pri ĉel. kun samaĝuloj.

Grafov Andrej V. 252126 Kiev, ul. Zatonŝkogo 23 A, kv. 10 — 20-j. studento-hemiisto, tm. pri ĉel.

Miĥajlov Oleg, 252061 Kiev, ul. Grazovaja 35, ap. 1—21-jara studento. tm. pri junulara vivo, pentroarto, muziko, akvaraj fiŝetoj, kolektas bk, esperantajojn kaj humorajn desegnojn.

Katunin Gennadij, SU-630064, Novosibirsk-64, Vatunina 47, kv. 4 radioinĝeniero, bk. kaj pm. — „Arto“, ĉel.

Kvasov Sergej, lernanto, SU-630082 Novosibirsk-82, Jukovskogo 121 kv. 43 — pm. pri transporto, ĉel.

Katunina Irina, lernantino, 630064, Novosibirsk-64 Vatunina 47, kv. 4 — interŝanĝi kalendarojn. ĉel.

Bulanova Inna, studentino, USSR 630007, Novosibirsk-7, Krasnij prospekt 16, kv. 62 — interesiĝas pri ĉevaloj, pm, bk.

Ŝulak Aleksandr, SU-662600 Abakan, Ĉertigaŝeva 118—250 — 23 j. studento ĉel, tm

Leo Lelle (19), SU 200035 Tallinn, Estonio, Oismäe 112-6 pri fotado, moderna kaj klasika muziko, bildkar-toj, pm, esp—aĵoj.

#### USSR

Dek Junulinoj 17-jaraj, SU 200016 Tallinn, 10. Keskkool, Esperanto kun samaĝaj e-istoj el la tuta mondo pri div. temoj.

Esperanto-klaso, SU 200029 Tallinn, 44. Leskkool, Keskuse 18, Estonio, 30 gelernantoj 16—18-jaraj pretas respondi al ĉiuj

Deziras korespondi anoj de E-klubo „Tero“, ĉiuj en USSR — 334200 Jalta

Badij Tatjana (23 j. frŭlino, instruistino de angla lingvo), str. Vesennjaja 1/12—42

Domaŝov Gennadij (48 j. elektro-inĝeniero), str. Vesennjaja 7—36.

Kravĉenko Tatjana (23 j. fraŭlino), str. Dzerĝinskogo 7—12

Kuznecov Pavel (15 j. lernanto, ) str. Gorĵkogo 14-105.



Jaro XXVIII, № 4  
julio — aŭgusto, 1981

#### REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov — ĉefredaktoro (Bulgario)  
Nikola Aleksiev (Bulgario)  
D-ro Detlev Blanke (GDR)  
André Cherpillod (Francio)  
William Gilbert (Francio)  
Oldrich Knichal (ĈSSR)  
Kimiaki Kurita (Japanio)  
Nguen Hac Trung (Vjetnamio)  
Boleslav Staszczak (Pollando)  
Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)  
Arta redaktoro: Kiril Drajev (Bulgario)  
Korektis: Mariana Elenova (Bulgario)

La Redakcio atendas kontribuaĵojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitajn liniojn, nur en gravaj kazoj — ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane ŝkribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj marĝeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

#### KIEN SKRIBI.

**Honora Prezidanto:** Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vĥod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

**Prezidanto:** D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Nepkőztársaság utja 73, Hungario.

**Vicprezidantoj:** D-ro Magomet Isaev, pros. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR

Glady-Claude, 36 Marne str. B-1030 BRUSSEL, Belgio.

**Generala sekretario:** William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio

**Sekretarioj:** Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyōto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, bl. 37, 11, 1404 SOFIA, Bulgario.

**Ĉefredaktoro:** Violin Oljanov, bulv. Emil Markov, P. K. 66, 1404 SOFIA, Bulgario.

**Centra administranto:** Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

**Centra kasisto:** (por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio. (Poŝtkonto CCR — ROUEN, 102—45:P)

**Respondeculo** pri landaj numeroj de PACO: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, GDR.

## kie aboni

**Aŭstralio:** N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld. 4556.

**Aŭstrio:** Ernesto Quiotensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN  
Aus 100

**Belgio:** Glady Claude, 36 Marne Str. 1030 BRUSSEL.

**Britio:** Paul Hewitt, Laycroft, Main Road., COVENTHAM Louth, Lincs LN11, OPF  
£ 4

**Bulgario:** Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA  
3 levoj

**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jil-ska 10, 11000 PRAHA 1  
30 kronoj

**Danlando:** Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH.  
35. d. kr

**F. R. Germanio:** Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN  
20 DM.

**Finnlando:** Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61  
30 fin. m.

**Francio:** Roger Degrelle, B. P.23, F-54510 Tomblaine (771, 77 R. Nancy — poŝtekkonto),  
40. fr. fr.

**Germana Demokratia Respubliko:** Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 BERLIN  
30 DM

**Hispanio:** Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona).  
750 pesetoj

**Hungario:** Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193  
36 forintoj

**Italio:** Riccardo Pinori, V. le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

**Japanio:** Kurita Kimiaki, 411, Misima Yata Sakura gaoka 1209 98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio)

**Kubo:** Rufino López, Havana Esp. -Rondo, Poŝkesto 314, HABANA 1

**Norvegio:** Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD

**Pollando:** RUCH — WARSZAWA

**Portugaliao:** Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto R/C A-LISBOA  
350 escudo

**Rumanio:** Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11, R-1900 TIMISOARA.

**Socialisma Respubliko Vjetnamio:** Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quand Thanh, HANOJ.

**Sovetunio:** Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9  
1, 80 rubloj

**Usono:** Bern Whel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304

**Aliaj landoj:** Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

#### GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco). El neosocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.

ISSN 0204-904X